



ESPERO KATOLIKA

KARAJ LEGANTOJ!

Kvankam mankas ankoraŭ 2 monatoj al la kuranta jaro, ni devas jam komenci la preparojn por la Jarlibro 1961. Por tio mi urĝe petas la kunlaboron de ĉiuj niaj membroj. Bonvolu rigardi ĉu la indikoj en la nunjara libreto estas ĝustaj, koncerne nomojn, adresojn, ktp. kaj ankaŭ ĉu la nombro da loĝantoj de via loko estas ankoraŭ bona. Al ĉiuj, kiuj povas kaj volas akcepti la postenon de Konsulo de IKUE, mi petas ensendi la koncernajn indikojn: la taskon kaj kondiĉojn vi povas legi sur p. 23 de la jarlibreto 1960.

Speciale al sekretarioj de lokaj kluboj mi havas peton: se via klubo jam estas menciita, rigardu ĉu la indikoj ankoraŭ validas; se ne, menciigu la ĉefajn indikojn kaj speciale la adreson de via sekretario. Ofte estas malfacile menciigi la datojn de la klubvesperoj, ĉar ĝenerale ili ne okazas je fiksjaj tagoj kaj horoj aŭ kelkfoje okazas ŝanĝoj laŭ la lokaj cirkonstancoj, sed se vi mencias la adreson de la sekretario aŭ alia funkciulo kiu disponas pri iom da tempo, eksterlandaj vizitantoj de via urbo povas esti informataj se ili iom neatendite alvenos. Komprenoble ĉiam estas preferinde, ke personoj kiuj intencas viziti esperantistojn aŭ grupojn en alia lando aŭ urbo, antaŭe skribe anoncu sian alvenon, por ke oni estu avertita. Denove mi faras urĝan alvokon al ĉiuj, kiuj povas helpi en tre efektiva maniero, nome pere de pagitaj anoncoj. Kiuj mem havas butikon, hotelon, aŭ iuspecan komercan entreprenon, povos eble lokigi anoncon en la jarlibreto, da kiu ni presigos 2000 ekz. Aliaj eble povos varbi ĉe hoteloj ktp. aŭ ĉe grandaj internaciaj entreprenoj, kies produktoj estas akireblaj en multaj landoj kaj por kiuj anonco kiu ne nur atingos la 2000 posedontojn de jarlibro, sed ankaŭ ties parencojn kaj konatojn, en pli ol 40 landoj, povas esti utila. La lasta kategorio eble ankaŭ volos anonci en E.K. mem, sed komprenoble niaj membroj devas atentigi ilin je tio. La tarifojn de anoncoj vi trovos en ĉi tiu E.K. numero.

Volonte mi denove atentigos je mia artikoleto en la antaŭa numero p. 161, precipe rilate al la aldono de la Sankta Skribo, ek de jan. 1961; kelkaj membroj jam nun pagis tiun libervolan aldonon de 1 guldeno = 4 steloj al la kotizo por 1961 kaj mi esperas ke multegaj sekvos. Koran dankon al ĉiuj bonvolemaj helpantoj!


Ne forgesu kapti la okazon, por varbi novajn membrojn, speciale atentigante pri la riĉa enhavo, regula aperado kaj malalta kotizo de nia revuo kun ties venontjaraj aldonoj de jarlibro kaj traduko de la Evangelioj. Pripensu kio okazus, se ĉiu membro gajnus unu novan: — kio nepre estas ebla, ĉar multaj katolikaj esperantistoj ne estas membroj de IKUE, eĉ ofte ne scias pri la ekzisto de IKUE kaj E.K.! — tiam ni povus eldoni pli dikan, pli belan revuon kun multaj fotoj. Se ĉiu el vi faros sian eblon, ni certe atingos tiun celon! Gajninte novan membron, tuj sciigu tion al nia Centra Oficejo, por ke mi havu ideon pri la bezonota kvanto de la januara numero.

Truus Durenkamp.

La 29-a IKUE-kongreso 1962 okazos apud Romo.

Kiel ni jam komunikis en la raporto pri la 4-a EEMK, niaj membroj de Romo transprenis sur sin la taskon, aranĝi nian sekvontan IKUE-kongreson. *Patro Giacinto Jacobitti* nun sciigis nin, ke ni povos disponi pri la tre moderna *Internacia Centro Pio XII por pli bona Mondo*, de la famkonata *Patro Lombardi S.J.*, situita je kelk-kilometra distanco de Romo, facile atingebla per aŭtobuso, apud Castel Gondolfo, kie la Papo restadas dum kelka tempo en la somero. Ni estas tre feliĉaj pro tio, ĉar tiamaniere ni ne nur povas loĝi kaj manĝi ĉiuj kune en tiu Centro, kiu disponas pri kelkcent ĉambroj, salonegoj por konferencoj kaj por manĝoj, kapelo, ktp., sed ankaŭ ĉar ĝi situas je lago, kaj do havas agrablan temperaturon. Cetere ni povos de tie fari ekskursojn en la ĉirkaŭaĵo kaj al Romo, kie ni sub gvidado de niaj romaj geamikoj povos viziti ĉiujn vidindaĵojn. Foton de la Centro, nia venonta kongresejo, ni donas ĉi-sube.

Estas ankoraŭ frue por povi komuniki detalojn; ankaŭ ni ĝis nun ne povas mencii la precizan daton, kiu dependas de la dato kaj loko de la tiujara Universala Kongreso, sed ni diskonigos tion tuj post kiam UEA mem scios tiujn datojn. Nia kongreso okazos 8-10 tagojn antaŭ la U.K., proksimume je la fino de julio 1962. Do vi jam nun povos rezervi parton de via libertempo de 1962 por tiu sendube interesa kongreso, kaj se necese komenci ŝpari por tiu vojaĝo!



ALVOKO POR LA SUDAMERIKAJ LANDOJ.

La Hispana Sekcio de „Pax Christi” petis helpon al Sekretariejo de Esperanto por grava afero. Jen: Oni deziras starigi amikecajn rilatojn inter lernejoj sudamerikaj kaj hispanaj. La delegitoj kaj membroj de IKUE en Sudameriko estas petataj diskonigi tiun ĉi alvokon de „Pax Christi”. La geinfanoj de la lernejoj partoprenontaj uzos hispanan aŭ esperantan lingvojn. La instruistoj interesitaj bonvolu skribi al: *PAX CHRISTI, Secretariado de Intercambio Escolar, Calle de Granada 26, MADRID, Espana.*

46-a Universala Kongreso de Esperanto.

Harrogate - 5-12 aŭgusto 1961 - Britujo

Korespondadreso: 46-a Universala Kongreso de Esperanto - Harrogate

Telegrafadreso: Esperanto Harrogate

Banko: Midland Bank Ltd., Harrogate

N-ro 1

OFICIALA KOMUNIKO

oktobro 1960

KOTIZOJ: Ĝis la 31-a de decembro 1960 validas jenaj kotizoj:

| | |
|------------------------------|----------------------|
| Kongresano | 75/- anglaj ŝilingoj |
| Edzino | 37/6 anglaj ŝilingoj |
| Gejunuloj ĝis 20 jaroj kaj) | 25/- anglaj ŝilingoj |
| Studentoj) | |

Plenaĝaj aliĝintoj, kiuj estas individuaj membroj de UEA (t.e. ricevas minimume la Jarlibron) rajtas rabaton de 8 ŝilingoj;

Edzino de Individua Membro rajtas rabaton de 8 ŝilingoj.

Ek de la 1-a de januaro 1961 la kotizoj plialtiĝos.

PAGOJ: La kotizo povas esti pagita ĉe ĉiu Oficiala Peranto de la Kongreso, ĉe UEA aŭ rekte ĉe la Kongresa Banko en Harrogate. Pagante la kotizon oni devas samtempe sendi plenigitan aliĝilon.

ALIGILOJ: Ĉiu esperantisto povas ricevi aliĝilon ĉe sia landa Esperanto-organizaĵo, ĉe UEA aŭ rekte ĉe la Kongresa Oficejo en Harrogate.

UNUA BULTENO: La unua Oficiala Bulteno de la Kongreso, 8-paĝa kaj riĉe ilustrita, entenanta plurajn detalojn kaj la provizoran programon de la Kongreso, estas ricevebla ĉe la landaj Esperanto-asocioj, ĉe UEA aŭ ĉe la Kongresa Oficejo en Harrogate.

17-a T.E.J.O.-KONGRESO: Ĝi okazos en la universitata urbo Cambridge, unu semajnon antaŭ la Universala Kongreso.

SEMINARIO „ORIENTO-OKCIDENTO“ De la 2-a ĝis la 4-a de aŭgusto 1961 (inkl.) okazos en Londono Seminario „Oriento-Okcidento“, sub la aŭspicioj de UEA. La manifestacio enhavos prelegojn de eminentaj esperantistoj, prelegojn de britaj orientalistoj, filmojn, muzikon, poezion kaj dancojn pri Oriento.

ARTA FESTIVALO: La 46-a Universala Kongreso en Harrogate havos samtempe karakteron de Arta Festivalo. Estas planitaj, inter alie, teatraj, muzikaj, filmaj kaj plastikaj-figuraj branĉoj, en kiuj povos ludi kaj ekspozicii esperantistaj artistoj.

TEATRAJ PREZENTADOJ: Profesiaj, aŭ parte profesiaj, Teatraj Trupoj havos okazon ludi en Esperanto dum la Universala Kongreso. Ili devas esti plene subvenciitaj de sialandaj ŝtataj instancoj aŭ de esperantistaj Landaj Asocioj. L.K.K. akceptos sinproponojn ĝis la 15-a de decembro 1960.

G. C. Fighiera, Konstanta Kongresa Sekretario.

NI GRATULAS

Geedziĝis nia membro D-ro Hermann Josef Frings, Zülpich-Hoven, Germanujo kaj Marie-Theres Hirschmann, la 15-an de oktobro 1960 en la paroĥa preĝejo de Rheinbach. Ni deziras al la juna paro feliĉan, sunplenan vivovojon!

KRISTO EN STOCKHEIM.

Memore de nia vizito.

La „*Taŭro-Ekspreso*” nur malofte haltante kuregis el Bruselo tra Kolonjo, laŭ la belega Rejno-valo. Kvankam mi estis tre laciĝinta de la eventoj kaj travivaĵoj de la Granda Semajno de la mond-esperantistaro kaj en mia cerbo ankoraŭ zumis la adiaŭoj de la multaj karaj geamikoj — el kiuj la plej multajn ni jam tute certe neniam plu revidos — mi ne povis forveni de la fenestro, kvankam mia edzino jam plurfoje urĝigis min eksidi komforte.

Sed ne nur la belega pejzaĝo, la admirindaj kastelruinoj — atestantoj de forpasintaj epokoj — imponaj, modernaj grandurboj katenigis mian atenton, sed samtempe miaj pensoj, kiel liberaj agloj elflugis tra la fenestro de la vagono, alten, pli alten ol la malproksimaj montaraj gigantoj... kaj mia animo ĉirkaŭbrakis dorlote la tuton de tiu ĉi kontinento, Eŭropo, kies filo mi estas, kie mi naskiĝis.

Jen! Tie estas ankaŭ vi, mia kara Patrinurbo, kiun la potenca Danubo duonigas, kun viaj belegaj ses pontoj, verdaj montoj kaj arbaroj!

Sed la bildoj antaŭ miaj spiritaj okuloj kun sama rapideco ŝanĝiĝis kiel tiuj trans la fenestro... Kaj mi jam antaŭ mi vidis denove la Kongresurbon, kiu kun amo gastigis nin dum semajno. Sed kun la sama amo atendas nin jam same bonegaj geamikoj en malgranda bavara vilaĝo, en ĉarma stiria urbo, ĉe la norvegaj fjordoj kaj mult-tre-multloke; en urbegoj, urbetoj, vilaĝetoj, sude, norde, oriente, okcidente... ĉie kun etenditaj manoj atendas nin nia kara, *granda*, unua Hejmlando: Eŭropo!

Kaj enpense, tie en la altoj, proksime al la Fonto de ĉiu Bono kaj Belo, mi humile dankis al Li pro Ĉio! Pro nia pasinteco, pro la nuno kaj pro la estonto...! Pro la multaj mirakloj, *por ni faritaj*, malgrandaj, sed mirakloj!

Mi dankis al LI pro mia dua, kara Hejmlando, tie, trans la „*Sep Oceanoj*”, kiu kun sincera amo adoptis nin kaj mi dankis al LI pro *tiu ĉi* miraklo, per kiu LI ebligis al ni, ke ni ankoraŭ foje en la vivo povas ĉirkaŭbraki ĉiujn niajn geamikojn ĉi tie!

La trajno subite ekhaltis por kelkaj minutoj. Jen, ni alvenis jam al la antaŭdujara Kongresurbo! — Miaj pensoj rekonsciiĝis kaj mi ekstremetis... — „*Malnova*” aŭ „*nova*” Hejmlando!?... „*Eŭropo*” aŭ „*Oceanio*”?... Kiun mi amas pli?... Al kiu mi fariĝis malpli aŭ pli fidela? — Turmentigaj pensoj, se via animo ne donas la respondon!

La „*Taŭro-Ekspreso*” denove komencis sian vetkuradon kun la tempo kaj samtempe ankaŭ miaj pensoj elflugis denove... se eble, ankoraŭ pli alten. Kaj tie, en tiuj altoj, kie mi jam povis vidi miajn malnovan kaj novan Patrujojn, kun supertera feliĉo mi ekkomprenis: — *Same mi amas ambaŭ*, kaj iliaj gefiloj estas same miaj gefratoj, kie ajn! — Kaj mi ĉirkaŭbrakis de tie ĉiujn gefratojn de la Sudo ĝis la Nordo, de Oriento ĝis Okcidento!

La maljuna, serena suno jam adiaŭis nin per siaj lastaj, lacaj radioj kaj ankaŭ ni alvenis al nova stacio de nia vojaĝo: Aŭgsburgo. Laŭ mia mapo ĉi tiu devas esti la loko por transvagoniĝi al *Stockheim*, nia nuna celo, kie vivas nia kara amiko, kiun donacis al ni nia Esperanto. Lin viziti *la plej unue*, estas nia arda kordeziro!

Post diversflankaj demandadoj ĉe fervojistoj evidentiĝis, ke la afero ne estas simpla, precipe kun amaso da pakajoj.

— Vi devos veturi de ĉi tie per loka trajno ĝis T., de tie per motor-vagono ĝis

la urbeto W. kaj en W. vi verŝajne ricevos taksion, ĉar la vilaĝo ne havas aŭtobuson.

Dank' al la ĝustaj informoj kaj al la afabla helpo de ĉieaj kunvojaĝantoj, ni feliĉe alvenis je malfrua vespero. Nia kara amiko jam atendis nin dum la tuta tago kaj niaj ĉirkaŭbrakoj estis tiuj de malnovaj amikoj, kvankam la unuan fojon vid-al-vide en la vivo.

— Sidu ĉi tien, sur mian liton — li invitis min — kaj vi, Sinjorino, ankaŭ kun via seĝo bonvolu veni apud min! — Kaj niaj temoj ne elĉerpiĝis dum tagoj, dum kvar neforgeseblaj tagoj, dum kiuj mia animo senfine riĉiĝis.

— Diru al mi sincere — li petis min foje — ĉu vi ne elreviĝis ekkoninte min persone, *min*, kiu jam depost pli ol kvindek jaroj ne kapablis mem forlasi la liton, kiu laŭ la sankta volo de nia ĉiela Patro ankoraŭ ĉi tie estas, kiam ĉiuj miaj infanaĝaj amikoj jam delonge forpasis?

Miaj okuloj pleniĝis je larmoj, kiam mi ekkaptis lian manon kaj respondis: — Nia Patro bezonis kaj bezonas vin. Li havis planojn kun vi kaj vi plenumas tiujn planojn laŭ Lia deziro en via situacio kaj medio... kaj mi estas feliĉa, ke mi povis lerni ĉi tie, ĉe vi, kiel oni vivas *kristane!*

Mi parolis el mia tuta koro, ĉar tie, en la hejmo kaj apud la lito de „nekuracebla malsanulo” mi konvinkiĝis ke la adepto de Kristo povas esti tute feliĉa, malgraŭ la teraj suferoj, jam ankaŭ en tiu ĉi vivo, se li konfidas sin al Nia Sinjoro!

Nia miro de tago al tago kreskis, kiam ni pli kaj pli ekkonis la ĉiutagan vivon de tiu ĉi, nin kun amo gastiganta familio, kies tutan vivon konsilas kaj direktas la „malsanulo” el sia lito, kie maljunaj geonkloj, junaj genevoj kunvivas, laboras kune, kiel nur la unuaj kristanoj povis tion fari! Kaj el tiu malsanula lito disradiiĝas la Krista Amo ne nur al la propra familio „malnovmaniere”, sed per modernaj rimedoj, ankaŭ pere de nia kara Esperanto!

En tiu rompiĝema korpo vivas la Venkinta Animo, kiu instruas, ekzemplon kaj vojon montras! Kaj la moderna „Pentekosta Miraklo” reokazas en la vilaĝeto, kiu fore kuŝas de la bruo de la ĉiutago: Familio, sacerdoto, instruisto, loĝantaro komprenis kaj akceptis la instruojn de sia, el lito „apostolanta” amiko, ke Nia Lingvo estas la „Lingvo de la Amo” kaj sekve de tio... Esperanto jam venkis en Stockheim!

La duan aŭ trian tagon mia amiko je mia peto konsentis, ke mi portu lin malsupren el lia ĉambro en la puŝseĝon por la ĉiumatena Sankta Meso. Kiam mi enbraken prenis tiun rompiĝeman, malgrandan korpon, mi sentis ke ĝi ne pezas pli, ol tiu de dekdujara infano kaj en tiu momento mi ekkomprenis la diferencon kaj valorojn de KORPO kaj ANIMO!...

Ekhaltinte kun la puŝseĝo antaŭ la altaro, mian animon ekkaptis kvietaj, neniam antaŭe sentita trankvilo kaj mi dankis la Sinjoron por ĉio... por Stockheim... Kiam la sacerdoto suprenmontris la Plej Sanktan Korpon, subite per brilo pleniĝis la tuta, ĉarma preĝejo... (ĉu la somermeza suno subite trabatis la nubetojn?)... kaj al mi ŝajnis, ke La Krucumito super la altaro benante etendis siajn ambaŭ brakojn kaj mi eĉ aŭdis Liajn vortojn, alparolante la Stockheim-anojn:

„Mi restas kun Vi, ĝis la fino de la mondo!”

D-ro J. H. el Auckland, Nov-Zelando.

En la birdodometo

Dika neĝo kovras ĉion: tegmentojn, stratojn, arbojn, ĉiun branĉon kaj branĉeton. En ĝardeno sur stango staras birdodometo; infanoj estis konstruintaj ĝin, kaj hodiaŭ ili plenigis ĝin per paneroj kaj grenoj.

La unuaj alvenantoj estas pasero kun edzino. „Ho!” krias li, „for la malsato! ni povas nun manĝegi!” Kaj ili tuj komencas bekpreni rapidege, sidante meze en la nutraĵo. Alflugas du graciaj paruoj. „For” bruas la pasero, „la grenoj estas nur por ni!” Afable, tamen tute ne subiĝeme, paruo diras;

„Tion mi ne kredas. Kiel vi volas pruvi tion?”

„Homoj disjetis la grenojn, kaj ni estas ĉiam ĉe la homoj, vi ne”.

„La paruo ridetas respondante:” Ĉu jen via tuta argumento? Ĉu vere vi kredas, ke la homoj volas nutri nur vin, kiuj ŝtelas iliajn ĉerizojn? kaj ne prefere nin, kiuj estas utilaj al la homoj?”

La pasero ne ŝatas argumenti, li pli volonte atakus la paruojn.

Bonŝance en tiu momento aperas merlo. „Bonan tagon,” salutas la merlo kaj la paruoj reciproke; la paseroj silentas furioze kaj manĝas. La merlo rimarkas la kolerajn, enviajn rigardojn; li konsilas al la paruoj flugi al la apuda domo kie sub la tegmento pendas paruo-ringoj. Ĝoje la parutoj dankas kaj forfluĝas. Unu diras? „Kiel impertinentaj estas la paseroj! kaj meze en la nutraĵo... oni perdas ja la apetiton! Vere, ili ne havas bonan edukadon.”

„Ŝajnas al mi,” reĉiras la alia, „ke la paserino iomete hontis pro la konduto de sia edzo.”

Intertempe la merlo serioze riproĉas la paserojn kaj klarigas al ili ke de la nutraĵo ili ja rajtas preni, ĉar la bonaj infanoj ne volas, ke birdeto malsatmortu; sed precipe ili volas, ke tiuj birdoj estu savataj, kiuj, formanĝante insektojn utilas al la homo. Iom pli modeste ol antaŭe la pasero diras: „Nu, iru do manĝi insektojn, kaj lasu al ni la grenojn”.

Ĝus alveninta fringo respondas: „Ni ja ne povas, ĉu vi ne vidas, ke neĝo kovras ĉion?” Kaj ankaŭ ili ekmanĝas.

„Ĉu estas permesate?” aŭdiĝas voĉeto de gaja rubekolo.

„Certe,” respondas la fringo. La pasero volonte forpelus la novan vizitanton, sed la paserino puŝetas lin per flugilo flustrante: „Lasu, ni estas ja jam sataj.” Sataj ili estas, sed ne forflugas; ili volas observi kaj vidi, ĉu restos io por morgaŭ.

La rubekolo baldaŭ malaperas. Sed venas du maloftaj gastoj: la verdfringulo kaj la pirolo. Kontraŭ tiuj gravaj sinjoroj la pasero ne riskas ribeli; tamen de la mienoj kun kiuj li flustras al la paserino, ili konkludas, ke li estas kolera. La bela, fiera, sed malkuraĝa pirolo jam sentas emon forlasi tiun lokon; li, kiu kutimas vivi libere en la arbaro; ne konas tiajn malgrandanimajn estaĵojn. La verdfringulo, kontraŭe, la noblulo, ŝatas juste paciĝi ĉion. Li diras: „Karaj paseroj, ĉu vi ne konsentas, ke estas pli bele, se ni racie interparolas? Mi vidas ke vi koleras, ĉar ankaŭ ni venas manĝi ĉi tie. Kredu, ni ne farus tion, se ni ne estus duone mortaj pro malsato. Vi ne ofte vidos nin ĉi tie, ĉar ni timas la homojn kaj amas nian vastan arbaron. Certe vi ne volas esti kulpaj je nia morto, ĉu? Nun pripensu trankvile: la homoj kiuj hodiaŭ disŝutis nutraĵon por ni, certe tion faros ankaŭ morgaŭ kaj dum la tuta neĝperiodo. Do vi ne malsatmortos.” La pasero humile konsentas. La paserino nun demandas la saĝan verdulon, kion li opinias pri la homoj. Li diras: „Vi ja vidas, ke ekzistas bonaj homoj.”

„Ho” interrompas la pasero, „ili faras nur pro egoismo!”

„Certe,” daŭrigas la demandito, „multon ili faras pro egoismo. Tiel longe kiel ili per tio ne malutilas al alia, ĉu oni riproĉu? Ĉu ankaŭ vi ne zorgas nur pri vi kaj viaj idoj? Kompreneble, se la homoj domaĝas iel al kunhomo aŭ besto, ili estas malbonaj, iliaj agoj, eĉ vortoj, estas kondamnindaj. Tamen multaj ne estas mem kulpaj je siaj malvirtoj, ĉar ili estis malbone edukataj, vidis malbonajn ekzemplojn. Noblaj homoj agas ne ĉiam el egoistaj motivoj, sed pro kompatato, pro amo.”

„Vi pravas,” pepas la pirolo. „Vi estas saĝa kaj bona,” aldonas la paserino.

„Ĉar mi restas for de la ĉiutagaj disputoj, vivas sola kaj libera, superrigardas kaj pripensas ĉion.”

„Jes, vere,” konsentas la etuloj, „sed ni ne povas vivi tiamaniere.”

„Ne; tial akceptu konsilon donatan en bona intenco.”

„Ni dankas, sinjoro,” kapjesas la paseroj; „morgaŭ ni dankkantos al la ĝentilaj infanoj.”

Ĉiuj adiaŭas, ĉar jam krepuskas.

Dum la flugo la verdfringulo diras al la pirolo: „Almenaŭ la paseroj diras malkaŝe sian opinion: pro tio oni povas diskuti kun ili. Mi malamas la nesincerecon; ĝi estas grava malbono.”

La pirolo konsentas: „Jes, kaj la paseroj ankaŭ akceptas konsilon. Do la kerno estas pli bona ol ŝajnas laŭ la ŝelo. Oni nur bezonas atentigi ilin. Bonan nokton, verdfringulo.”

„Bonan nokton, pirolo.”

Dirante tion, ili disflugas por serĉi lokon por dormi.

E. F.

LA URBO IS: legendo aŭ realaĵo?

Oni rakontas, ke en la V-a jarcento post Kristo regis super la bretona lando bonega reĝo, nomata *Gradlon*. Loĝis tiu reĝo en *IS*, urbo ĉe la maro kontraŭ la Atlanta Oceano. Tiu civito, oni diras, estis ŝirmata kontraŭ la maro nur per tre fortika digo, fermita de kluzo, kies ŝlosilon la reĝo mem posedis.

Gradlon havis filinon tre belan, sed kruelan kaj malbonhumoran, nomatan *Dahut*. Li multe amis ŝin kaj vigle bedaŭris ŝian maldecan vivon. Ŝi estis malkontenta pro la patraj riproĉoj, kaj por pli facile plene satigi siajn pasiojn, lin enkarcerigis. Por ebligi la defluon de la riveregaj akvoj en la maron, oni ĉiujare samdate devis malŝlosi la digan kluzon. Sed malfacila estis la fermado de tiu pordo kaj tio povis efektiviĝi nur post kiam estos plenumitaj iaj ritoj kaj preĝoj al Dio. Dahut tamen, neniel atentante pri tiuj ordonoj, nek eĉ pri la mortominacoj kontraŭ ŝi laŭte diritaj de *sankta Guenolo*, pia ermito loĝanta en la urba ĉirkaŭaĵo, volis ŝlosigi la kluzon foreste de sia patro, ĉar tiukaze ŝi estus devinta lin elirigi el la karceron.....

Dahut do ne observis la konsilojn de la Sanktulo kaj ŝlosigis la kluzan pordon, ne plenuminte la fiksitajn ritojn. Tuj ekestis terura ŝtormo, kaŭzanta eksterordinare grandajn ondojn, kiuj proksimiĝis la urbon kaj momente ĝin enabismigis.

La reĝo Gradlon, mirakle liberigita fare de sankta Guenolo, kuris kaj prenis sian kulpiĝintan filinon kun si, por ŝin savi de la morto. En la palaco li ŝin trovis, surĉevaligis ŝin kaj galope fuĝis al la kontinento. Malfeliĉe la maro ilin antaŭiĝis kaj pli rapide iris ol la tamen rapida reĝa ĉevalo.

Subite voĉo sonis: „Gradlon, se vi ne volas morti, forlasu la diablon, kiun vi portas kun vi!”

Gradlon tamen plifirmigis sian ĉirkaŭbrakon, ĉar li volis ŝirmi sian filinon karese amatan. Ili do ambaŭ pereis, enabismigitaj de la oceanakvoj. Tiam tuj la maro kvietiĝis. Kiam la taglumo reaperis, nenio pri la urbo Is, ĝia palaco, ĝiaj domoj kaj riĉaĵoj, estis restinta, ĉio por ĉiam estis ekstermita!

* * *

Kion pri tiu legendo oni devas kredi? Se ni fidas al la malnova bretona kroniko, la urbo Is estus konstruita apud *Plomarch*, ĉe la *Duarnenez* Golfo, en la nuntempa departemento *Finistère* (Okcidenta Francujo). Oni trovis en la ĉirkaŭaĵo postsignojn de romaj vojoj, deirantaj malsupren en la maro, kio supozigas, ke tiuj vojoj iras al civito poste subakviĝinta.

Ĉu la ekstermiĝo de Is, se tiu ĉi vere ekzistis, okazis pro falego de la tersurfaco aŭ pro iu granda marmoviĝo? Pri tio ni scias nenion.

Sondadoj estas faritaj en tiu marloko, helpe de precizaj instrumentoj, kaj la esploradoj kondukis al gravaj rezultoj. Oni asertas, ke la aparatoj „palpesentis” la realan Gradlon’an reĝciviton. Se la ektrovo de Is iam plicertiĝos, oni fotografie povos akiri detalan scion pri la graveco kaj la fizionomio de la urbo, kuŝanta en la Golfo de l’Mortintoj (*Baie des Trépassés*) kaj eble doni la veran historian klarigon de la ekstermiĝo de tiu urbo.

Bernardo Jahier.

PROPONOJ DE NIAJ LEGANTOJ.

S-ro Anton Kronshage, Wuppertal, Germanujo, skribas:


Aŭdinte en Munkeno kaj leginte en E.K. pri la verŝajna perdo de 250 membroj mi opinias, ke — se la situacio tiel malboniĝos — eble jena vojo estos irebla: *Gesamideanoj* el la pagipovaj landoj krom sia propra EK-ekzemplero abonu duan, por tiun duan sendi **letere** al samidean(in)o, kiu bedaŭrinde pro la konataj cirkonstancoj ne plu povas ricevi ĝin rekte. Jen pruviĝos, ĉu ni estas pretaj iom fari kaj provi helpi tiujn samcelanojn kaj fidelajn infanojn de la Eklezio. Le letera afranko kaj la abonprezo ne haltigu niajn gefratajn kunsentojn, sed male: **NI ESTU SOLIDARAJ!** Do, mi estas preta transpreni duan abonon kaj atendas, kiam la bedaŭrinda perdo fakiĝos, de vi la duan ekzempleron kaj adreson de unu el tiuj karaj gefratoj. Mia pago tiam sekvos.

S-ro Eduardo Ant. Pestana el Lisbono, Portugalujo, skribas:

Via artikolo kaj la raporto pri la 4a EEMK en E.K. sciigas la legantaron pri la minaco de la perdo de 250 membroj de IKUE, kio estus grava risko por nia organizo. Se la minaco efektiviĝos, kaj ĝis la varbado de novaj asocioj kompensas la perdon (kio povos daŭri pli malpli unu jaron) la solvrimedo estas, ke aliaj 250 membroj duobligu senprokraste la kotizon. Certe, se vi faros la alvokon, ili alkuros: mi ne mankos!

Noto de la Redakcio:

Ni volonte publikigas ambaŭ proponojn kaj kore dankas la nomitajn samcelanojn. Intertempe la minaco efektiviĝis jam por 50 membroj; por la resto ni vivas inter timo kaj espero. Dio donu, ke ni baldaŭ povos publikigi pli bonajn novaĵojn!



En la aĝo de 30 jaroj mortis 28.8.1960 nia fidela membro *Joseph Frank Dupont* en *Montreal, Kanado*. Li estis humila, pia, helpema homo, kiu deziris esti sacerdoto, sed pro grava malsano ne povis atingi sian celon. Li tamen restis en la seminario kaj deĵoris kiel pedelo de la kapelo. Li estas enterigita en la tombejo de la sama seminario, kie lia frato studas filozofion. Dio rekompencu sian fidelan serviston kaj konsolu la parencojn. *

Dum unu semajno **AKLE**, Vieno kaj **IKUE** perdis du multjarajn fidelajn anojn, meritplenajn kaj signifajn, ĉiu laŭ sia speciala karaktero kaj maniero, modela katoliko kaj vera samcelano:

4.IX. mortis, preskaŭ 88jara, s-ano *Karlo Gasperini*, ofickons. e. p. — Jam 50-jarulo li eklernis nian lingvon, kiun li baldaŭ majstre regis, i.a. kiel deklamanto, preleganto kaj post 1945 ankaŭ kiel aktiva kunlaboranto de l' Aŭstria Esperanto-Instituto. Ĝis la lastaj monatoj de sia vivo li pliriĉigis la **AKLE**-kunvenojn per siaj priliturgiaj, literaturaj kaj ankaŭ bonhumoraj prelegoj. — Nombro de ges-anoj, ankaŭ **AEF**-prez. dir. *Cech*, akompanis lin sur la lasta vojo, transdonante florkronon kun surskribo verdrubanda: *Esperanto salutojn: AEF - AKLE - Internacia Esperanto Muzeo*.

Lastajn vortojn de danko kaj adiaŭo en Esperanto povis diri s-ano *Mudrak* (al kiu la kara mortinto dum jardekoj estis kvazaŭ patreca amiko).

Nur tagon poste, la 9.IX., mortis subite, 75-jara, s-ano *Leopoldo Huber*, asek. ĉefinsp. e.p. em. distriktkonsilanto, esperantisto dum preskaŭ 50 jaroj, aganta ankaŭ por nia movado precipe en la Kolping-domo kaj ĉiam helpeme aranĝanta tieajn laŭkokazajn esperantistajn Di-servojn. Ankaŭ ĉe lia enterigo ĉeestis ges-anoj, transdonis florbukedon kun Esperanto-salutoj kaj parolis sac. prof. d-ro *Hohenwarter*.

Dio donu al ili eternan pacon kaj rekompencan!

ASKETA SONETO

Sinjur'!

Vi povis fari ja per volo Via
Ke mi naskiĝu en insul' sovaĝa,
kaj estas, krom varie belpejzaĝa,
Plej nobla lando, la patrujo mia

Estas pura la nomo familia
kaj povus esti krima, malkuraĝa;
Mi estas laborema, ne malsaĝa;
mi povus esti malhonora, fia.

Vi volis ke mi konu la ĉagrenon,
kaj tra la malfeliĉon kaj malplenon,
samkiel faris mi dum hor' plezura
Vin dankas daŭre mia vol' humila,
ĉar montris Vi al mi per voj' facila
Suferon, de la viv' la vero nura

Amalia Núñez Dubús.

SE VI ESTAS MALFELIĈA.

Mi estas la *Lumo*: kaj vi ne vidas min.
Mi estas la *Vojo*: kaj vi ne sekvas min.
Mi estas la *Vero*: kaj vi ne kredas min.
Mi estas la *Vivo*: kaj vi ne serĉas min.
Mi estas la *Instruisto*: kaj vi ne aŭskultus min.
Mi estas la *Sinjoro*: kaj vi ne obeas min.
Mi estas via *Dio*: kaj vi ne petas min.
Mi estas via granda *Amiko*: kaj vi ne amas min.

— — — — —
Si vi estas *malŝeliĉa*:

ne riproĉu min.

Gravurita sur antikva kruco antaŭ centoj da jaroj. El „In Slagorde”, tradukis:
H. J. F. W., ARNHEM, Nederlando.

NOVEMBRO

Post la sunoraj du monatoj,
per kiuj ĉi aŭtuno pompis
tra urba parko, super stratoj
griztaga vento arbojn kombis.


Ĉiele pendas plumba grizo
kaj ŝanĝis sin la or' branĉara,
de kronoj falas je surprizo
latun' kaj kupro ordinara.

Nur velka verdo, morta bruno,
kaj nigra merl' en herbo pala
serĉas manĝerojn de aŭtuno
en foliaro terenfala.

Post ni jam tago de l'Mortintoj
kaj baldaŭ venos vintro frida, *)
frost' pinĉos nin en fingropintoj
kaj logos ĉambra varm' invita.

Jiri Korinek

*) malvarma



Marie Holková

I N T E R P A R O L O K U N L A N U B E T O J

Blankaj nubetoj en la alto,
kiu akcelas vin sen halto,
por ke dorlotu vi en sin' dekliva
erikon disfloran?
Grilo en kaŝ' al ni muzikas,
birdoj la kanton plukonigas
beke en boskon foran.
Marŝon harpludas vent' al ni sur branĉoj.
Ni velas plu facile tra pejzaĝoj.
Blanka nubaro ĉielpenda,
ĵa kio estas do farenda
por vidi sin, ĉielan roson rigardante?
Ĉesu rigardi nur vin mem.
Malriĉ' por lekantet' ne estas ĝen'.
Infane paŝu kor' via nudplande.
Kun nubetoj, birdoj kaj arbar' majflora
pri eden' perdita sonu kanto glora.
Nubetoj blankaj super tero,
al kiu porti la mizeron,
se rozon anstataŭas flor' urtika?
Al Polmo *) tranajlita portu ĝin.
Se falis vi — relevu vin.
En larmopluv' eĉ tero sin freŝigas.
Sur ŝipoj malstabilaj de prov' dolora kaj sufera
ni naĝu nubfacile, ni naĝu al patrujo vera.

* *manplato*

*El la ĉeĥa tradukis
Jirí Korínek*

H O R I D O D E D I O

Ho rido de Dio,
kiu ĉiun tagon denove
disrompas mian horizonton,
kvazaŭ ĝi estus la tago unua
post tuta vivo en peko.

Ho rido de Dio,
kiu ĉiun tagon denove
briligas la altaron
de ĉi tiu tera templo.
— kie la sufero
dumnokte ankoraŭ staris
ĝis al la sojlo
de la morto. —

Ho rido de Dio,
disrompu vi ĉiun matenon denove
la malluman monologon
de ĉiuj miaj zorgoj,
kvazaŭ ĝi estus la tago unua!

S. C.

„ M I A P A T R U J O ”

INTERNACIA KONKURSO DE INFANA DESEGNADO KAJ PENTRADO

Organizata de Pola Radio sub la protektado de la Pola Komitato por la Aĵeroj de UNESKO

R e g u l a r o

1. La temo de la konkurso estas „Mia patrujo”. La partoprenantoj de la konkurso havas nelimigitan rajton elekti temon pri sia lando (scenoj el la hejma, familia, antaŭlerneja, lerneja vivo, pejzaĝo urba kaj vilaĝa de la propra lando, ludoj, solenaĵoj, legendoj, pri la patrolando, historiaj eventoj ktp.)
2. La partoprenantoj de la konkurso havas nelimigitan rajton de elekto de la tekniko: koloraj kraĵonoj, paŝteloj, ĉina inko, tempero, akvarelo, oleaj farboj, kraĵono ktp.
3. La minimuma formato de desegnaĵo devas esti 25 x 35.
4. La konkurson povas partopreni infanoj el ĉiuj landoj de la mondo, estantaj ĝis 15-jaraj.
5. Desegnaĵoj ne subgluitaj, kartone pakitaj, devas esti sendataj ĝis la 1-a de decembro 1960 el la eŭropaj landoj, ĝis la 1-a de februaro 1961 el ekstereŭropaj landoj, al la adreso: POLA RADIO, VARSOVIO, POLLANDO — kun la kromnoto: „LA KONKURSO DE INFANAJ DESEGNAĴOJ”. La desegnaĵoj devas havi dorsflanke legeble skribitan: antaŭnomon, nomon, aĝon kaj precizan adreson de la infano aŭ de la lernejo, el kiu la desegnaĵoj estas senditaj, kaj ankaŭ eventuale nomon kaj antaŭnomon de la instruisto.
6. Por plej bonaj desegnaĵoj estas aljuĝotaj premioj: oraj, arĝentaj kaj brunaj medaloj, diplomoj, alvenoj por 10-taga estado en Pollando, skotero, radioriceviloj kun transistoroj, porteblaj radioriceviloj, fotoaparatoj, kompletoj da pupoj, ludiloj, produktoj de la pola popola arto, gramofonaj diskoj, albumoj, specialaj premioj de diversaj institucioj kaj personoj.
7. Specialaj premioj estas aljuĝotaj al instruistoj pri desegnado el lernejoj kaj artistaj rondoj de eksterlerneja edukado, kiuj distingiĝos en la konkurso.
8. La plej bonaj desegnaĵoj estos montritaj en ekspozicio en Varsovio kaj eldonitaj en albumo.
9. La desegnaĵojn aprezos jurio konsistanta el reprezentantoj de Pola Radio, de la instruistaro, de la arta kaj kultura mondo.

Tria Internacia Konferenco de Popolaj Universitatoj

Tiu manifestacio okazis en Strasburgo, la 9-an, 10-an kaj 11-an de septembro, sub la aŭspicioj de Unesko kaj patronado de altaj instancoj. S-ro Pierre Petit, prezidanto de la Eŭropa Asocio de Popolaj Universitatoj, estis unu el la organizantoj. 200 personoj el 14 landoj partoprenis en la laboroj, kiuj estis dividitaj en kvin komisionoj, nome: administrado, junulaj kaj kulturdomoj, muzikaj kaj artistaj aktivecoj, gazetaro, kino kaj radio-televido. Kvankam la uzata lingvo estis la franca, 20 personoj el Francujo, Italujo, Germanujo, Svedujo kaj Svisujo scipovis Esperanton.

Estis rimarkinde, vidi kvar nigrulojn, kiuj estis observantoj por la franca Komunumo. Unu el ili, s-ro Bebey, radio-parolanto, entuziasmiĝis pri Esperanto kaj registris sur sonbendon konversacion inter diversnaciaj Esperanto-uzantoj.

La arta programo estis mirinda. Vendredon vespere okazis koncerto organizita de la Franca Radio kun la Simfonia Orkestro de Radio Strasburgo. Sabaton vespere estis varietea programo kun teatraj aktoj kaj muzikajoj. Fine, dimanĉe, en Obernai sur la placo de la urbodomo ni vidis folklorajn dancojn de studentaj artistoj el Jugoslavio, Tahiti kaj Hispanujo.

Malavare akceptis nin diversaj organizaĵoj: la Komerca Foiro de Strasburgo, la Konsilantaro de Eŭropo, la urboj Strasburgo kaj Obernai. Plie oni vizitis tre interesajn muzeojn, la katedralon kaj la urbon Strasburgo sub la gvidado de gravaj specialistoj, kaj lundon la haveno de Strasburgo proponis promenadon sur la rivero Rejno.

Dum la Ferma Laborkunsido ni aŭskultis la raportojn de la komisionoj kaj voĉdonis kelkajn deziresprimojn. Inter ili rezolucio pri la koordinataj kursoj de Esperanto, kun raporto al Unesko, estis unuanime akceptata. La Eŭropa Asocio fariĝas tutmonda. La ĉefa oficejo estos en Strasburgo; aliaj oficejoj estos en Buenos Aires kaj (por Afriko) en Novakchott. Ĉiu el ili uzos diversajn lingvojn, inter kiuj Esperanto.

Ni revenis hejmen tre kontentaj, ĉar oni aŭdis multe pri nia lingvo, kaj ni povas esperi, ke Esperanto estos ĉiam pli uzata en la Popolaj Universitatoj. Estus bone, se kiel eble plej multaj samideanoj interesiĝus pri tiu grava kultura movado.

J. GUILLAUME

El: Heroldo de Esperanto.

Jarlibro 1960

Listo de la Sacerdotoj:

Italujo: Msro. Carlo Rossi, Episkopo de Biella (Vercelli)

Belgujo: Patro Christiaan Beelen C. J. vicparoĥestro, Rue Leclercq 19, Celles-Hg.

Germanujo: Ludwig Adlkirchner, Seestr. 55 (13b) Rottach-Egern.

Hindujo: Henry Josef C. D., Assisi Villa, Nellikakurlei P. Travancore Kerala.

Listo de la Konsuloj:

Belgujo, Verviers: s-ro J. M. Geron, rue du Marteau 119.

Brazilo - Paranaŭai - Parana: Resp. Patro Ulrico Goevert O. Carm. Paroĥestro. S-ro Pedro Real, P. K. 89, direktoro de mezlernejo.

F-ino Maria Madalena Real, P. K. 89.

S-ro Natal dos Santos, P. K. 89.

Monte Santo de Minas, Sul de Minas: Resp. Frato Severiano de Souza s.s.s. Seminario Sacramentino.

Germanujo, (22a) Mülheim-Ruhr: S-ino Vidvino Martha Mattern, Aktienstr. 156.

Hispanujo, Tarrasa, (Barcelona) 80.000: S-ro Sebastiano Chaler, dompentristo, San Mariano 159, tel. 2674.

Librolisto: p. 45 Koko krias jam, elĉerpita.

NIA JUBILEA KASO

Ĝis 15.10.60 envenis jenaj donacoj:

Anglujo: s-ro M. en S. f 5,25; *Germanujo:* s-ro J.T. en M. f 5,—; *Portugalujo:* p. G. P. en F. f 19,—; antaŭa sumo f 198,75, nun entute f 228,—. Tre koran dankon al ĉiuj mildaj donacintoj kaj donacontoj!



24. *Se eraras la elektrona cerbo...*

El „*Südot-Tagespost*“, Graz 26/8 ĉerpis s-ro Klaus Perko (kion mi cetere jam ié alie ankaŭ legis): „La spirito estas volema, sed la karno estas malforta” — ĉi tiun tekston traduki de la hispana lingvo anglen estis la tasko de elektrona cerbo en Novjorko. La rezulto estis evidenta malsukceso. Ĝi tekstis: „La viando estas difektita, sed la brando estas ankoraŭ bona”.

25. *El la Eŭkaristia Kongreso en Munkeno*, krom tio, kion ni mem spertis ni notu el la gazetaro ekz. „*Fährmann*“, majo '60: „Por la tradukado de la prelegaranĝoj optika simultan-instalajo estos starigata. ĉi tiu instalajo ebligos samtempan prezentadon de la unuopaj prelegoj en ĉiuj... (*interpunktado de C.A.O.*) ses kongresaj lingvoj en la Kongressalono de la

Germana Muzeo kaj en la Bavara halo de la Ekspozicia parko. Dum la referatoj aperas ĉiufoje kvin tradukoj sur ekranoj diverskoloraj laŭ la unuopaj lingvoj. La skribareo por ĉiu lingvo estas 16kv.m. en la Kongressalono, respektive 25 kv.m. en la Bavara halo. Ĉi tiu kvinlingva simultan-instalajo, per kiu povas esti kaptata ajne granda partoprenantaro, en Eŭropo estos starigata unuan fojon por la Eukaristia Mondkongreso.”

„Junuloj el la superaj klasoj de la altlernejoj kiel akompanantoj kaj interpretistoj por eksterlandaj pilgrimgrupoj helpos.”

Laŭ diversaj raportoj tiu fama simultan-instalajo ne estis sukceso; ekz. dum la internacia kunveno de la Pax-Christi-movado la tekstoj sur la ekrano paliĝis kaj post la duono de interesa parolado tute malaperis! Tamen oni ŝajnas preferi ĉiusecajn akrobataĵojn pere de aparatoj super „artefarita” lingvo: ĉu eble tiuj aparatoj ne ests „arte” faritaj? Kio estas pli *natura* afero ol nia *artefarita lingvo*?

26. *Refoje la Eŭk. Kongreso:*

El la oficiala festgazeto artikolo: „*Sopiro al la unueco*” kun la subtilo: „*La sekvoj de Babilono*”: „Nature ne ĉio glate ordiĝis. Nenia surprizajo. Ankaŭ katolika kongreso de la nacioj devas batali kun la sekvoj de la babilona turkonstruo. Je tio ankaŭ la akiraĵoj de la XXa jarcento nenion ŝanĝas. Fremde sonantaj nomoj sonoris tra la ĉambroj kaj koridoroj; iu ree estis serĉata. Nu, tio ankoraŭ ne estis tiel grava. Sed okazis ankaŭ io pli grava; kiam ekz. alvenis telegramo el *Saigono*: „*Hua thuoc tri hen cua cho nguyen nguyen*”: kion nun fari? Restis nur la Nigra Tabulo kaj la eteta espero pri tio, ke spite de ĉiuj malhelpaĵoj la rapidsciigo (telegramo) trovu sian adresaton.”

27. *Ekzamen-danĝeroj.*

En la Federacia Respubliko de Germanujo ĝis 80% de la eksterlandaj studentoj faras malsukcese siajn antaŭ- kaj interekzamenojn. La ĉefaj kialoj de ĉi tiu zorgiga evoluo i.a. estas nesufiĉa lingvoj-scio, nesufiĉa faka enkondukado en la studadon... (El „*General-Anzeiger Wupperthal* 1/10 '60).

28. *Unesko-kunveno bezonas 150 oficistojn kaj interpretistojn.*

La jurnalo „*Stadt-Anzeiger*” en Kolonjo raportas, ke la lasta konferenco de registaraj reprezentantoj de Unesko postulis 150 „sekretariinojn, gefakulojn, interpretistojn kaj oficistojn”. Tiom granda kaj multekosta kvanto da personaro estis kaŭzita grandparte de uzado de kvar lingvoj, kio konsekvence postulas samtempan interpretadon de ĉiu parolado kaj tradukadon de ĉiu dokumento en ĉiun el ili. La kostoj por instalajo de plurlingva interpretaparato atingas 100.000



ESPERANTO VIVAS



FRANCUJO. En 12 porinstruistaj seminarioj okazis regulaj Esperanto-kursoj, kiujn sekvis 200 estontaj geinstruistoj po unu horo ĉiusemajne, dum la lernojaro 1959/60. En *Aix-en-Provence* kaj *Perpignan* la kursoj estis devigaj por la gelernantoj de la unua klaso, en la 10 aliaj seminarioj nedevegaj. La sukceso instigis al plua klopodo dum la lernojaro 1960/61. *

NEDERLANDO. Post la peticio, subskribita de 800.000 gepatroj, por enkonduki la instruon de Esperanto en la lernejojn, la Ministro de Instruado intencas permesi tion en lernejoj por daŭrigata instruado (t.e. 3-4 jarojn post la elementa lernejo). Tiu instruado estos nedevega. Ankaŭ li pripensas instali oficialan diplomon por la instruado de Esperanto en la lernejoj, do por profesiaj instruistoj. Ni esperu, ke Parlamento kaj Senato akceptos la proponon.

La redakcio de „Het Zuiden”, populara kvartalgazeto en la suda de Roterdamo kaj ĉirkaŭaĵoj kun semajna eldonkvanto de 80.000 ekz., ek de 7.10.60 publikigas Esperantokurson. La samspeca gazeto por aliaj kvartaloj de tiu havenurbo „De Havenloods” kun eldonkvanto de 143.000 ekz. intencas publikigi semajnan Esperanto-kurson se sufiĉe da legantoj esprimos la deziron por tia kurso. *

JUGOSLAVIO. S-ro Slobodan Ješić gvidis Esperanto-kurson en la urbeto *Aleksinac*. Partoprenis 124 personoj de ambaŭ seksoj, de plej diversaj profesioj kaj aĝoj: infanoj, gejunuloj, mezaĝaj personoj kaj eĉ 74-jarulo, kiu dufoje ĉiusemajne venis de sia vilaĝo, situanta 16 km. de *Aleksinac*, por partopreni la kurson! Post la kurso oni fondis Esperanto-klubon, kies membroj deziras korespondi kun eksterlandaj samideanoj. Skribu al la kursgvidanto, s-ro S. Ješić, V. Putnika 51, Niš, Jugoslavio.

Dum la lerneja jaro 1959/60 okazis nedevegaj Esperanto-kursoj en 30 elementaj kaj mezlernejoj en 13 lokoj de Slovenio. Entute 1020 gelernantoj estis enskribitaj, el kiuj 689 ĝisfine vizitis la kursojn. La instruado estis inspektata de oficialaj lernejoj instancoj. La Esperanto-Instituto de Slovenio sendis detalan nacilingvan raporton pri la kursoj al la Konsilantaro por la Lernejoj en Slovenio.

USONO. Juna instruisto el *Gvatemalo*, s-ro Julio R. Mazariegos, faris diversajn prelegojn en Usono por geinstruistoj kaj lernantoj. Nesciante la anglan lingvon, li prelegis pri sia lando en Esperanto, kaj loka samideano tradukis. Tiu pruvo pri la uzebleco de Esperanto faris grandan impreson. Sekve lerneja instanco instigis al akcepto de Esperanto kiel plenrajta lernobjekto en la Vespera Lernejo por Plenkreskuloj de *University City*, la plej granda antaŭurbo de *St. Louis*. *

DANUJO. La dana Ministro pri Internaj Aferoj, s-ro Sören Olesen, faris danlingvan prelegon en la dana radio pri „Esperanto — la solvo de la interpopola lingvoproblemo.” Li priskribis la lingvajn malfacilaĵojn kaj donis supervidon de la Esperanto-movado, ties konstruo, metodoj, sukcesoj, revuoj ktp. kaj pledis por enkonduko de Esperanto kiel la dua lingvo por ĉiuj sur la bazo de nedevego. *

germanajn markojn. Bona faka interpretisto ricevas 60 dolarojn tage. Spite de tiuj altaj kostoj, neniu rimedo estas ĝis nun eltrovita por helpi la partoprenantojn, kiam ili formetas la aŭskultilojn. (*El Pola Esperantisto*).

La numerojn 25,26,27,28 mi ricevis de s-ro *Kronshage*; sendu viajn interesajn al
sac. C. A. Ouwendijk, Rijpwetering, Nederlando.



ESPERANTA RESUMO DE LA STENOLOGO KAJ STENOGRAFIO, de Prof. Delfi Dalmau, Barcelona, 1961. 15,5 x 12 cm. 16 pĝ. Prezo 2 resp. kup. — Tre interesa studo pri la nomita temo kaj proponoj por internacia stenografio. *

SUDTIROLO EN LA JARO 1960, de Hugo Steiner. Eld. Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Aŭstrujo. 21 x 14,5 cm. 64 pĝ. Prezo 6 resp. kup. = 1,80 ned. guld. Por Membroj de Int. Esp. Muzeo 5 resp. kup. — La broŝuro ne volas esti politika diligentlaboro, sed simpla citado de la enhavo de eble preskaŭ ĉiuj koncernaj dokumentoj pri la

aktuala afero pri Sudtirolo. De la konata Esp. pioniro ni nur povas atendi senriproĉan lingvon kaj bonegan stilon. Cetere estas memkompreneble, ke li uzas Esperanton por diskonigi sian starpunkton kaj klopodi akiri subtenon en internaciaj rondoj! La germanlingva eldono aperis en 500 ekz., la Esp. en 2000 ekz. * *MEMORLIBRO* eldonita okaze de la centjara datreveno de la naskiĝo de D-ro L.L. Zamenhof. Eld. U.E.A. Centro de Esploro kaj Dokumentado, Londono, 1960. 29 x 22,5 cm. 104 pĝ. da teksto en 2 kolonoj + 16 pĝ. da fotoj. Tutkola bindo kun o:surpresoj. Prezo 12,50 ned. guld. = 50 steloj. — La redaktoro de la verko, Prof. D-ro Ivo Lapenna, bonege aranĝis la enhavon. Post diversaj oficialaj aferoj kiel listoj de la Internacia Patrona Komitato kaj de la Internacia Organiza Komitato de la Jubileo, biografiaj datoj pri D-ro Zamenhof, la Deklaracio de Mainz, sekvas diversaj artikoloj de famkonataj esperantistoj, ekz.: Prof. G. Waringhien, Francujo kaj Prof. D-ro Edmond Privat, Svislando, koncize priskribas la *karakteron kaj karieron de Zamenhof*, precipe rilate al lia vivoverko, Esperanto. Pri la *Valoro de Esperanto el lingvistika vidpunkto* skribas Prof. D-ro W. E. Collinson, Anglujo; *Esperanto, la lingva kreaĵo de Zamenhof* estas la teksto de artikolo de Prof. D-ro E.A. Bokarev, Sovetunio; Prof. D-ro Ivo Lapenna, Jugoslavio (nun Britujo) skizas la *Grandecon de D-ro Zamenhof*; la okulkuracisto D-ro A. Albault, Francujo liveris la artikolon: *D-ro L. L. Zamenhof, oftalmologo, iniciatinto de la Internacia Lingvo*; Prof. D-ro Paavo Ravila, Finnlando, pritraktas la *Mondlingvan Problemon*, lia samlandano Vilho Setälä parolas pri la *Genio de Zamenhof: Efektiva Lingvo*; la poetino Marjorie Boulton, Anglujo jetas lumon sur la *Majstron kiel Pionira Poeto*; William Auld, Skotlando parolas pri la *Internacia Lingvo kiel Belarta Tradukilo*, donante multajn specimenojn; D-rino Clelia Guglielminetti, Italujo pritraktas la *Plej junan Literaturon en la Mondo* kaj multaj aliaj liveris valorajn artikolojn. La verko ankaŭ prezentas la koncizajn enhavojn de diversaj tre interesaj prelegoj dum la Jubilea Jaro fare de eminentuloj en nia movado, belajn poemojn, ĉefe pri D-ro Zamenhof kaj nia movado de niaj famaj poetoj, kaj multajn pensojn de nia Majstro mem.

Trarigardo pri la celebrado de la Zamenhof-jaro resumas la diverslandajn jubileajn aranĝojn kaj informoj pri la favora sinteno de UNESCO formas indan finon de la teksto. Post tio sekvas la multegaj fotoj el la vivo de Zamenhof kaj la Esperanto-Movado.

Ni povis doni nur superrigardon de la ĉefaj titoloj kaj verkintoj de ĉi tiu Memorlibro, bonega laŭ enhavo kaj belega laŭ aspekto, sed instigas ĉiun veran esperantiston aĉeti la libron kaj legi, pli bone: pristudi ĝian tre interesan kaj lernigan enhavon. *

MINIATUROJ: Geraldo Mattos. Speciala omaĝo al Zamenhof 1859-1959. Eld.



Anoncetoj

Kun Francoj, Japanoj kaj tuta mondo deziras korespondi: *Konrad Fischer*, Kilia-neum, (13a) *Miltenberg* (Germanujo). *
Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn el ĉiuj landoj, precipe el novaj ŝtatoj kaj eŭropaj landoj kontraŭ egalkvantoj da belgaj p.m. *Sac. Henri Schaeken*, kaplano, *Tessenderlo*, Belgujo. *

Legantoj en Jugoslavio! La kotizoj por 1961 estos: *Espero Katolika* 800 din., por *Vojo, Vero, Vivo* 350 din. — La reprezentanto. *

La unuan multobligitan numeron de „Birdo” serĉas: *s-ro J. Bras*, St. Charles, *Esch N.B. Nederlando*. Sendu al li proponon. *

S-ro B. van Arem, Hotel „Suisse, *Mariastraat 4, Utrecht, Nederlando*, deziras korespondi kun hotelistoj en Esperanto aŭ angla, franca kaj germana lingvoj. *

La Internacia Katolika Inĝormejo donas senpage informojn al nekatolikoj kaj sendas al ili sian dumonatan gazeton „*Vojo, Vero, Vivo*”. La katolikoj bonvolu subteni tiun belan apostolaton per mondonacoj kaj/aŭ abono je V.V.V. kies abonprezo estas 2,50 ned. guld. = 10 steloj jare. Nederlandanoj pagu al la sekretario de I.K.I. *Gasthuisstr. 68, TILBURG*, poŝtkonto 268507. Por eksterlandanoj la adreso estas: *Sac. H. Roosen*, redaktoro VVV, *Huize „St. Gerlach”, HEER (L)*, Nederlando, poŝtkonto 134120. Ĉiam indiku por kiu celo via pago estas destinita. La landaj reprezentantoj de IKI kaj eventuale la reprezentantoj de IKUE/E.K. volonte akceptos pagojn.

SOPIRE SERĈATAJ por grava Instanco! UEA-Esperanto jarkolektoj 1939, 1940, 1941, 1942, 1946; IEL-Esperanto Internacia jarkolektoj 1937, 1940, 1941, 1942, 1943, 1945. Rekompence laŭeble estos sendataj porfilatelaj neuzitaj italaj poŝtmarkoj. Serĉataj ankaŭ la noj 1, 2, 6 (1955) kaj 1, 2 (1956) de Norda Prismo. Adresu al *Prof. Konrado ĈERRI*, EK - *Casella Postale 159 - BIELLA* (Vercelli, Italujo).

ĜUSTE VI estas tiu, kiun ni serĉas..... se vi estas katolika fraŭlino inter 21 kaj 30 jaraĝa, se vi estas lerta hejm-prizorgantino, se vi absolute flue parolas kaj senerare skribas esperanton, se vi ŝatus restadi dum unu tuta jaro en franclingva esperantista hejmo (agrabla familia vivo), se vi interŝanĝe de kompleta senpaga gastigado (nutrado, loĝado) pretas vigle helpi en ĉiuj virinaj hejmaj taskoj, se vi havas jam bonajn nociojn de la franca lingvo kaj deziras plibonigi ilin per ĉiutaga praktiko, tiam bonvolu **tuj** skribi kun kompleta vivrakonto kaj freŝdata foto al: **Michel Pilloy** (anonceto Katolika), **Espéranto-Office, Ottingnies (Brabant), Belgujo.**

Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio de Janeiro, Brazilo 15.12.59. 16x11 cm. Kun „Prologo el mia Albumo” de *Marjorie Boulton*. Prezo 1,— guld. = 4 steloj. La broŝurita libreto aspektas plaĉa, eĉ eleganta. Nur ĉiu dua de la 78 paĝoj estas uzata por po unu kvinlinia verso, la resto restis nepresita. Kaj la enhavo? Laŭ ni poemo ne nur devas esti bona kaj bela el lingva, resp. beletra vidpunkto, sed ankaŭ interesa laŭ enhavo. Verdire ni opinias, ke la plej granda merito de ĉi tiu verketo estas, ke ĝi ne prenas multan valoran tempon por legado, ĉar lirikaĵoj pri floroj kaj birdoj ĉiam finiĝantaj en sopiroj al virinaj mamoj kaj tiaspecaj erotikaj tre baldaŭ tudas!

Truus Durenkamp.

URĜA ALVOKO.

La sekvontajn monatojn okazos i.a. jenaj katolikaj internaciaj kunvenoj:

24 - 28.11.60 en Romo: *Int. Federacio de Kristanaj Metallaboristaj Unuiĝoj* (angle: Int. Federation of Christian Metalworkers Unions).

Decembro 1960: en Leopoldurbo, Kongolando: *Pax Romana, Intern. Katolika Movado por Intelektaj kaj Kulturaj Aĵeroj* (angle: Catholic Movement for Intellectual and Cultural Affairs).

12.1.1961: en Romo, Italujo: *Katolika Unuiĝo Internacia por Socia Servado* (angle: Catholic Intern. Union for Social Service).

Januaro 1961 en Romo, Italujo: *Internacia Katolika Infanoŝico* (angle: Int. Catholic Child Bureau).

Februaro 1961 en Monte Carlo, Monako: *Internacia Asocio Katolika pri Radio kaj T. V.*

Kiuj samideanoj, prefere partoprenontaj en la kunvenoj, volas propagandi tie la uzadon de Esperanto, pere de diverslingvaj flugfolioj — *senpage haveblaj!* — kiujn ni tiucele presigis?

Bonvolu skribi al: *s-ro Rik de Roover, Luchtvaartstraat 28, Borgerhout-Antwerpeno, Belgujo.* Ne forgesu mencii la deziritajn lingvojn (francan, anglan, germanan, hispanan, italan) kaj la kvanton de ĉiu lingvo. — Antaŭdankon!



- Kial vi ŝtelis tiujn ŝuojn?
- Ĉar mi pensis ke ili estas novaj!
- Kio estas inter la rido kaj la ploro
- La nazo.
- Kial vi troviĝas en la karcero?
- Ĉar mi estas kompetenta metiisto.
- ???
- Jes, ĉar mi faris la samajn biletojn kiel la Nacia Banko.

— En la komenco de mia kariero kiel ĵurnalisto mi neniel havis sukceson, — rakontis la konata verkisto Ernesto Hemingway. — En la unua monato mi eĉ kvarfoje vendis artikolon.

— Tio ŝajnas al mi tute ne malbona rezultato — opiniis amiko.

— Certe ne! — ridis Hemingway, — sed tiuj kvar artikoloj estis: mia palto, mia ĉapelo kaj du kostumoj!

SinJORINO: Antaŭ ol dungi vin, mi volas scii ĉu vi ŝatas katojn?

Servistino: Pro tio ne faru al vi zorgojn, sinJORINO, mi manĝas ĉion.

Kampano venis en restoracion de granda urbo. Li eksidis ĉe tablo, larĝe disfaldis la manĝotukon, sternis ĝin sur sia brusto kaj fiksis ĝin ĉirkaŭ sia nuko per granda nodo. Tiam li mansignis al kelnero, kiu estis rigardinta la ceremonion, kaj demandis:

— Ĉu mi povas manĝi ĉi tie ion bonan?

— Certe, sinjoro, — la kliniĝanta kelnero respondis — sed por razigi vin vi devos iri trans la straton.

PROVERB - ENIGMO

Serĉu vortojn de kvin literoj laŭ la priskriboj.

La komencaj literoj de la trovitaj vortoj formas esp. proverbon.

1. o ; larvo de papilioj,
2. o ; profesio
3. o ; marfiŝo
4. o ; meblo
5. o ; statuo de diaĵo
6. o ; insektmanĝanta besto
7. o ; brando eltirita el rizo
8. o ; valizo
9. o ; manĝebla molusko
10. o ; parto de la buŝo
11. o ; antikva greka monero
12. o ; kadavro konservita per balzamaj procedoj
13. o ; haroj de vango kaj mentono
14. o ; blanka malmola substanco, kiu konsistigas la dentegojn de
15. o ; veturilo elefantoj.
16. o ; manĝa kaj trinka diboĉo
17. o ; aŭreolo
18. o ; bela tre malmola ligno
19. o ; rabobirdo
20. o ; sovaĝa besto, simila al granda kato
21. o ; dekreto de rusa caro
22. o ; parto de la kolo.
23. o ; ilo de ŝuistoj
24. o ; pensoj kaj bildoj de dormantoj
25. o ; longkrura birdo
26. o ; pompo
27. o ; kampara terposedaĵo
28. o ; birdo el la vico de la paseroj
29. o ; ŝirmilo
30. o ; periodo
31. o ; tre maldika silka ŝtofo
32. o ; malhela bildo de lumigita objekto.

Li de Jong-Roobeek.

SOLVO DE LA KRUCVORTENIGMO. p. 178.

Horizontale:

A. ĉapitro; vasta. B. aline; skarp. C. risko; mordi. D. pato; termit. E. mirt; bu. F. noktuo; onklo. G. trias; olivo. H. frukto; rabi. I. agord; dren. J. urs; leono; rob. K. ge. L. eskim; kapitol. M. spato; anemono. N. torak; redon. O. intrig; mandat. P. id; fil; ilo.

Vertikale:

I. ĉarpent; sugestii. II. alia; orf; respond. III. pist; kiras; kart. IV. inko; taŭg; gitaro. V. teo; muskol; moki. VI. tio; tre. VII. osmer; odo; kar. VIII. korto; anemi. IX. varm; nordo; pedal. X. ardi; klar; kimon. XI. spit; liber; tondi. XII. bovino; on; al. XIII. ankaŭ; lojto.

Li de Jong-Roobeek



RADIO VARSOVIO elsendas ĉiutage de 16.30 - 17.00 M.E.T. duonhoran programon en Esperanto sur mallongaj ondoj: 25,09 - 25,16 - 25,42 - 31,01 - 31,45 - 31,50 - 42,11 m. kaj sur meza ondo 249 m. (resp. 11955 - 11925 - 11800 - 9675 - 9540 - 9525 - 1205 kc/s).

RADIO ROMA Esperanto-Fako, Casella postale 320, Roma (Italujo).
La dissendoj okazas de h. 18.55 ĝis h. 19.10 (M.E.T.).
Ondlongoj: metroj 30.90 = Mc/s. 9.71; 41.24 = Mc/s 7.27; 50.34 = Mc/s 5.96.
Prelegantoj: marde: alterne S-ro L. MINNAJA kaj Prof. D-ro V. MUSELLA;
merkrede: S-ro Luigi MINNAJA; vendrede: Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA.

En la monato novembro ni tre speciale memoras n'ajn mortintojn...

NOVEMBRO 1960

1: Tra la literaturo; 2: Kuriero de Esperanto; 4: La itala komika aktoro Mario Riva; 8: Novaĵoj el Italujo; 9: Kuriero de Esperanto; 11: Leterkesto kaj bibliografio; 15: Italaj kanzonoj en Esperanto; 16: Kuriero de Esperanto; 18: Italaj provincoj: La Spezia; 22: Romaj bazilikoj: Santa Cecilia in Trastevere; 23: Kuriero de Esperanto; 25: Latinaj dramistoj: Plautus; 29: Italaj belartaj urboj: Gaeta kaj Formia; 30: Kuriero de Esperanto.

DU SKULPTISTOJ.

Aŭgusto Rodin, la eminenta franca skulptisto gvidas en florenca muzeo sian konatinon, kaj montrante al ŝi skulptaĵon de giganta mano diras: „Bonvolu rigardi ĝin bone. Ĝi estas verko de Mikel-Anĝelo.

Kiam la konatino demandis de kie li tion scias, ĉar sub la skulptaĵo ne estas subskribo, Rodin respondis: „Nur du homoj povus finskulpti tian manon: Mikel-Anĝelo kaj mi. Kaj ĉar mi ĝin ne skulptis...”

SUEZAJ AKCIOJ KAJ ARTAĴOJ

Johano Cocteau citas sekvantan telefonan interparolon kun amerika miliardulino:

- Sinjoro Cocteau, ĉu vi havas iun Picasson por vendo?
- Certe, tri mi havas. Ĉu vi volas rigardi ilin?
- Ne, bonvolu sendi al mi la plej multekostan.
- Bone, sed kio okazos, se ĝi ne plaĉos al vi?
- Ne diru sensencaĵojn, sinjoro. Kiam mi aĉetadis Suez-kanal-akciojn mi ne deziris, ke oni sendu al mi la tutan kanalon.

TARIFO POR ANONCOJ

Anoncetoj en la koncerna rubriko: senpage kontraŭ ensendo de la koncerna kuponaro, kiun ĉiuj membroj ricevas post pago de la kotizo.
Reklamoj sur la kovrilo de ESPERO KATOLIKA:

tuta paĝo 50 gld.; duona paĝo 25 gld., kvarona paĝo 12,50 gld.

Reklamoj en la JARLIBRO:

tuta paĝo 40 gld.; duona paĝo 20 gld.; kvarona paĝo 10 gld. (1 gld. = 4 steloj).

Eldonkvanto: minimume 1600 ekz. kiuj estas disvastigataj en 40 landoj.